

La Karavelo

Beletra Esperanto-Revuo pri la Portugallingva Literaturo

n-ro 015
marto – aprilo -
majo 2009

Fondita de João José Santos, en Portugalio, en oktobro 2007



E S T R E M O Z MARCA



feiradas
escolas
2009
estremoz

Foiro de la Lernejoj de Estremozo

26-a, 27-a k. 28-a de marto 2009

La Karavelo enstandiĝis



paĝoj 22-24



Santos klarigas
al s-ino Helena,
ke esperanto plu vivas

La Karavelo n-ro 015

marto - aprilo - majo 2009



- | | | |
|-----------------------------------------------------------------------------|--------------------|--|
| 1 Kovrilo:
<i>Foiro de la Lernejoj de Estremozo</i> | El la redaktejo | |
| 2 Enhavo – Kolofono | El la redaktejo | |
| 3 Ĉefartikolo:
<i>Ni semas kaj semas konstante...</i> | João José Santos | |
| 6 Fernando Pessoa:
<i>Mesaço (34-a poemo)</i> | João José Santos | |
| 7 Ricardo Reis (Fernando Pessoa):
<i>Majstro (poezio)</i> | Francisco Wechsler | |
| 8 <i>Iliado Latina (1) (poezio)</i> | Gerrit Berveling | |
| 11 <i>Tri poemoj</i> | Yohanes Manhitu | |
| 12 <i>Skizo de lingva historio de Brazilo (historio)</i> | Roberto Ribeiro | |
| 16 <i>La koro (poezio)</i> | Imre Szabó | |
| 17 <i>Timema (rakonto)</i> | Geraldo Mattos | |
| 20 <i>Universalaj Kongresoj de Esperanto (4-a – 1908) (historio)</i> | Djalma Pessata | |
| 22 <i>Esp-evento: Foiro de la Lernejoj de Estremozo</i> | João José Santos | |

La Karavelo 1-12 --- 45 €
du paperaj volumoj kun 12 revuoj
formato proksima de A4
kovrilo kolora, enhavo blankenigra
en bonkvalita papero

La Barko: La artikoloj enhavantaj la apudan bildon estas la plej facilaj por komencantoj. Uzu ilin por plibonigi vian lingvonivelon, aŭ tiun de viaj lernantoj. La vortoj de la artikoloj enbarkigitaj nur estos klarigitaj, se ili ne aperos en la Reta Vortaro:
<http://www.reta-vortaro.de/revo/>
aŭ en la esperanta vikipedio: <http://eo.wikipedia.org/>

Responso: Pri ĉiu artikolo, ties gramatiko, enhavo, stilo kaj vortprovizo responsas la koncerna aŭtoro.

Al blindaj homoj: Kunlaboru bv. por plibonigi la legadon de *La Karavelo* far blindaj homoj.

Uzado de tekstoj el *La Karavelo*: Ne uzu tekstojn el la revuo *La Karavelo* aŭ el alia skribaĵo de LK en alia gazeto, sen antaŭa laŭcela permeso de la LK-direktisto. Havinte permeson por uzi tekstojn, ĉiam indiku la fonton. Ekz.: «El la revuo "La Karavelo", n-ro 9, junio 2008, paĝoj 5 ĝis 8». Nepre neniu havas la rajton iel modifi la tekstojn, aŭ resumi ilin. La permeso estas nur por revuoj, neniam por libroj aŭ por aliaj publikigaĵoj.

Kolofono

Konstantaj verkistoj...

Djalma Pessata
Eduardo Novembro
Edward Jaśkiewicz
Francisco Wechsler
Geraldo Mattos
Gerrit Berveling
Imre Szabó
Irina Mironova
João José Santos
Leo De Cooman
Luiza Carol
Nikolaj Neĉaev
Paulo Sérgio Viana
Roberto Ribeiro
Roger de Castro Gotardi
Tibor J. Szabadi
Valentin Melnikov

Direktas, redaktas, kompostas

João José Santos

Reviziistoj

Kurt Fischer
Luiza Carol - pri *La Barko*
Roger de Castro Gotardi
Valentin Melnikov

Telefono (+351) 268 919 000

PoŝTel. (+351) 960 13 15 15

Retadreso lakaravelo@gmail.com

Retejo www.esperantopt.com

Adreso

LA KARAVELO – Dr. João José Santos
Fonte Velha, caixa 3003
7100-078 Estremoz – Portugal

Recenzeblaj libroj

estu sendotaj al la supra adreso.

Reguloj

Pri la principoj, labormaniero kaj reguloj de *La Karavelo*, nepre elŝutu kaj legu la dosieron *Regularo de La Karavelo*, el la ĉefa paĝo de nia retejo. Ĝi estas konstante aktualigata.


La Katalogo de *La Karavelo*
estas ĉiam aktualigita en

www.esperantopt.com



La Karavelo

libera softvaro
© João José M. Q. dos Santos



**Ni semas kaj
semas konstante...**

João José Santos



ENKONDUKO


En marto, Estremozo vidis unuafoje budon kun la nomo "La Karavelo – Esperanto" en sia *Foiro de la Lernejoj* (konsultu la lastajn paĝojn de ĉi revuo). En aprilo, komenciĝis unuafoje kurso de esperanto en la gimnazio de Estremozo. En majo, okazis prelego pri "Esperanto kaj Lingvaj Rajtoj" en *AtéJazz Café*, enkadre de la aktivajoj de la Grupo de Estremozo de Amnestio Internacia. Samtempe, la gvidanto de tiuj agadoj verkis la esperantan lernolibron por portugallingvanoj *Esperanto em 30 horas*. Ankaŭ samtempe la sama mi editas la rakontlibron de Luiza Carol. Ĉu vi povas pardoni vian redaktiston, ke ĉi tiu numero estas trimonata? Iel ajn, en la fino de 2009, ni havos la dek promesitajn numerojn... espereble... kun la Dia permeso, kaj kun la helpo de ĉiuj gnomoj...

Pri fiaĵoj de la estraranoj de Portugala Esperanto-Asocio, kiuj malaprobis mian kandidatiĝon al la ĉefdelegiteco de UEA en Portugalio, tio menciindas tiom, kiom mia baldaŭa operacio al la galveziko, tio estas, temas nur pri "obstinaj baroj" al la distruigo de esperanto, kies antaŭenmarŝo neniam haltis, ne ĉesas kaj plu avancoj.

* * *

Jen la esperantigo de la prelego eldirita portugale, en la konferenco okazinta en la 19-a de majo 2009 en AtéJazz Café, laŭ invito de la Grupo de Estremozo de Amnestio Internacia.

www.esperantopt.com



Afiŝita tra Estremozo.

Esperanto kaj Lingvaj Rajtoj

Esperanto kiel inter-nacia lingvo

Laŭlonge de la homara historio, la popoloj ĉiam okupiĝis pri la problemo de la internacia lingvo, de la helplingvo, kiam malsamaj popoloj aŭ etnoj interrilatiĝis.

Oni tuj distingu la ideon de *inter-nacia lingvo*, kiu laŭnome estas lingvo por la rilatoj inter la nacioj, disde la ideo pri ununura universala lingvo por la tuta planedo, kion la esperantistoj ĝenerale ne aprobas.

La biblia epizodo de la Babelturo montras kiel, tra la tempoj, tiu maltrankvilo estis en la spirito de la popoloj.

Kiel do la homaro solvadis la problemon pri la inter-nacia lingvo? Per la uzado de la lingvo de la reganta popolo, laŭ la vidpunkto kultura, ekonomia kaj ĉefe milita. Lingvoj kiel la helena, la latina, la kastilia, la portugala, la franca kaj la angla, inter aliaj, estis uzataj kiel inter-naciaj lingvoj, en la epoko de la apogeo de la respektivaj imperioj. Pro la manko de lingvo kreuta ¹ laŭcele por helpi la rilatojn inter la popoloj, ĉi tiuj uzadis la lingvon de la reganta nacio. Ĉi tiu kutimaĉo solvi la problemojn perforte, laŭ darvinisma perspektivo, oni heredis de la besta regno. Tamen, en multaj aliaj kampoj, la homa estaĵo iom post iom liberiĝis el la emo privilegii la forton en la solvado de la problemoj, por adopti agmanierojn pli raciajn, planitajn, kaj kiuj obeas al la etikaj

¹ kiu estus kreita

principoj. Jen nur tri ekzemploj:

La nocio pri "jura ŝtato" postulas al la civitano konduton bazitan sur la leĝoj, kiuj celas interpreti la etikajn valorojn de la socio. Tamen, tio ne ĉiam okazis. Ju pli oni retroiras en la historio, des pli oni trovas aŭtokratajn politikajn sistemojn.

En la urbigado, ne ĉiam ekzistis tiom da planado kiel nuntempe. En niaj tempoj, la urbojn oni projektas, dum alitempe ili naskiĝis laŭ ordigado, kiu nur atingis la centran placon kaj apudajn stratojn, kaj kelkfoje ili ne konstruiĝis laŭ iu ajn ordigado. Oni komparu la brazilan urbon Braziljo kun Rio de Ĵaneiro por kompreni kiel nepra estas la urba planado por la vivo de la modernaj urboj.

La zorgoj pri la sano de la planado mem kaj de ĝiaj enloĝantoj, en ekologia perspektivo, gvidas onin al la enraciigo de rimedoj, al la reuzado de la rubaĵoj kaj al la planado de ĉiuj agoj sur la planado.

Oni povus doni pli da ekzemploj elmontrantaj, ke la homo, iom post iom, trovis raciajn kaj science studitajn solvojn por plibonigi siajn vivkondiĉojn. Ne ekzistas iu ajn motivo por ne apliki la saman racian principon al la solvo de la problemo de la helplingvo inter la popoloj. Kelkaj, pro manko de informo, kiu naskas la antaŭjuĝojn, ankoraŭ pensas, ke planita plingvo, pro tio ke ĝi ne estas tute natura, ne havas esprimivajn atributojn por taŭgi kiel lingvo inter-nacia.

Antaŭ ol la komenco de esperanto, filozofoj kaj lingvistoj de agnoskita merito, kiel Lajbnizo (Leibniz), Kartezio (Descartes) kaj Ŝlajero (Schleyer) kiel multaj aliaj, jam havis projektojn de planita internacia lingvo.

Oni distingu la nocion de "lingvo" disde la nocio de "lingvoprojekto", por kompreni kiel esperanto sin apartigas de la lingvoprojektoj. Por ke lingvoprojekto estiĝu lingvo, ĝi devas enradikiĝi en la socion kaj en la familiojn, kaj ĝi devas esti uzata en multaj situacioj de la ĉiutaga vivo. Iu libro kiu enhavu gramatikon, vortaron, lernmetodon, kelkajn tekstojn kaj aneksojn, eĉ se ĝi estas tre bone ellaborita, ĝi ne konstituas lingvon. Nur kiam tiu sistemo ekhavas adeptojn, kiuj ekuzas ĝin en multoblaj sociaj kaj familiaj situacioj, la lingvoprojekto estiĝas vera lingvo.

Post la apero de esperanto, aperis aliaj

lingvoprojektoj, kiel ido (ido), interlinguo (interlingua), fasilo (fasile) kaj dekoj da aliaj. Kelkaj el tiuj lingvoprojektoj havis kaj ankoraŭ havas kelkajn parolantojn. Tamen, el ĉiuj lingvoprojektoj, la ununura, kiu gajnis signifon en sociaj kaj familiaj medioj estis la Internacia Lingvo Esperanto.

Prie, esperanto ne estas malnatura lingvo. kiel oni aŭskultas tro ofte. Se ĝi estus tia, ĝia leksiko estus inventita, tiel kiel ĝiaj gramatikaj reguloj. Esperanto estis pensita, science planita, por estiĝi lingvo por la rilato inter la popoloj kaj etnoj kun malsamaj lingvoj, sed ĝia leksiko kaj ĝia gramatiko elvenas el la naturaj lingvoj. Kelkaj diras "ĝi estas miksaĵo", kio ankaŭ ne estas science korekta. Se la vorto "miksaĵo" estus adekvata al la klasifikado de lingvo, la plejparolataj eŭropaj lingvoj estus miksaĵo multe pli varia kaj kaosa ol esperanto. En esperanto, troviĝas vortoj el diversaj originoj, kiel okazas en la portugala. Ĝia gramatiko ankaŭ heredis la sperton de la lingvoj plej parolataj en Eŭropo. Esperanto ja ne estis konstruita malnature.

Unuflanke, esperanto estas lingvo ankoraŭ juna, ĉar ĝi havas iom pli ol 120 jarojn. Aliflanke, esperanto jam kapablas respondi pli rapide kaj efike al la postuloj de onia konstante inventema socio, ol la naturaj lingvoj, kiuj bezonas pli da tempo por asimili la nomojn ligitajn al konceptoj, kiuj naskiĝas ĉiutage en la mondo.

Serĉante en la interreto, oni konstatas la viklecon per kiu esperanto sin disvolvas tra la mondo. La esperanta Vikipedio jam enhavas pli ol 113000 kapvortojn, kaj Jutubo milojn da videoj. Estas familioj, en kiuj esperanto estas la lingvo de la gepatroj kaj de la gefiloj. UNESKO daŭre rekomendas al la ŝtatemprojoj la disvastigon kaj la instruon de la internacia lingvo esperanto, ĉar ĝi servas samajn celojn de tiu internacia organizo.

En Portugalio, esperanto estis malpermesata dum la nomita "Nova Ŝtato", ĉar la tiama politika povo rigardis esperanton, kiel lingvon de komunistoj. Fakte, esperanto ne estas kunligita kun iu ajn politika idearo. La diktatoroj, tamen, malpermesas ĉion, kion ili ne konas, ĉefe la ideojn, kiuj igas la popolojn rilatiĝi kun aliaj popoloj. Salazaro (Salazar), Franko (Franco) kaj Musolino (Mussolini) malpermesis esperanton, sed Stalino (Stalin) kaj aliaj el la orienta Eŭropo

faris la samon.

Esperantistaj asocioj plejdiversaj ekzistas tra la mondo, ĉefe en la plej grandaj urboj. Multaj editejoj produktas revuojn kaj librojn en esperanto, en tioma kvanto, ke la esperanta bibliografio enhavas nuntempe mildekojn da libroj. Oni povas aserti, ke laŭ la kultura vidpunkto, la esperantisma movado estas vasta kaj firma.

Kiuj estas kaj kion celas la esperantistoj?

La esperantistoj disiĝas tra la tuta planedo, ne konstituantaj homogenan grupon laŭ siaj manieroj esti kaj pensi.

Komparante kun popolo, kun la portugala popolo, oni povas diri ke la portugala popolo, ne estanta homogena grupo laŭ la raso, la religio, la politiko kaj laŭ la kulturo, tamen unuigatas en patriama konscio, surbaze de sia lingvo, de sia literaturo, de sia muziko, de sia historio kaj de sia kultura diverseco. Simile, la esperantistoj konstituas heterogenan grupon laŭ la raso, la kulturo, la etno, la politiko, ktp, sed ekzistas io, kio ilin unuigas, kaj kio permesas identigi ilin kiel esperantistoj.

Kvankam ilia enorma diverseco, kio unuigas la esperantistojn estas, unue, la fakto, ke ili privilegias la internacian komunikon per la internacia lingvo esperanto. Due, sed ne malpli grave, malantaŭ la esperantisteco estas la konscio, ke ĉiuj homoj devas esti respektataj en ĉiuj rajtoj, kaj ke neniu devas esti diskriminata. Tiel, la praktiko de komunikado en esperanto estiĝas la konkretiĝo de pli vasta idealo, kiu estas la interfrateco inter ĉiuj popoloj, venkante la barojn naciajn, etnajn, lingvajn kaj aliajn, pere de lingvo science kreita por la internaciaj rilatoj. Ĉi tiu lingvo, estanta propraĵo de la tuta homaro, ne estas propraĵo de iu ajn konkreta popolo.

En rilato kun aliaj esperantistoj, de sia aŭ alia lando, la esperantisto renkontas homojn tre malsamajn unu de la aliaj, kun vidpunktoj kiuj povas esti similaj al nesimilaj al la siaj. Tamen, la certecon, ke ĉiuj ni estas homoj kun la devo kaj rajto je la respekto, oni atendas de ĉiu esperantisto. Tia teniĝo, subkuŝanta je la esperanta idealo ekde la komenco de ĉi tiu lingvo, gvidas la esperantistojn al interrespektaj rilatoj kaj

ofte al vera interamikiĝo.

La esperantistoj, laborante por la disvastigo kaj starigo de esperanto en la tuta mondo, protektas samtempe la naturajn lingvojn. Multaj lingvoj jam mortis en la planedo. Aliaj velkas, iom post iom, ĝis la kompleta malapero. Oni ne povas permesi, ke tia kultura propraĵo malaperu, pro la perforta regado de iu ajn ununura etna lingvo. Kiam lingvo mortas, substanco parto de la kulturo de ĝia popolo mortas kun ĝi. Kaj ja forigi la kulturon al popolo estas neniigi ĝian animon.

Eĉ la plej fortaj lingvoj, kulture kaj politike pli bone defenditaj, kiel la portugala, estas ĉiutage surbombataj de la sennecesa trudo de terminoj kaj esprimoj, kiuj trouze perfortas nian lingvon kaj kulturon. La lasta termino vaste uzata en Portugalio estas "bookcrossing", kvazaŭ la portugala lingvo ne kapablas esprimi la koncepton de "cruzamento de livros" (libro-trairado).

Ne estas bedaŭrinde, ke oni parolu malbone fremdan lingvon, sed eĉ estas angore, ke oni abdiku el sia lingvo kaj kulturo por... vivi laŭ la modo.

La esperantistoj defendas, ke la angla lingvo devas esti tiel respektata kiel iu ajn alia lingvo. Tial, la anglalingvaj esperantistoj preferas la uzadon de esperanto kiel internacia lingvo, ol la aĉa uzado de la angla, kio degradas la aliajn kulturojn kaj la anglalingvan kulturon. Fakte, la angla estas parolata kaj skribata tra la mondo, laŭ la ebleco de la lingvaj kompetentoj de la homoj, kiuj klopodas ĝin paroli adekvate, eĉ ŝatus tion fari, sed kiuj ĝin piedfrapas ĉiumomente.

La respekto ŝuldata al iu ajn homo necese implicas la respekton al liaj moroj, al lia kulturo kaj al lia lingvo. Esperanto, krom la fakto ke ĝi estas la plej racia solvo, kaj ekonomie pli realigebla por solvi la problemon de la internacia interkomunikado, starigas fratajn laĉojn inter la popoloj, disvolvas la praktikon de la toleremo, kaj donas al la homo la ekologian konscion bezonatan de la globa vilaĝo. Ω

www.esperantopt.com



Mesaĝo - de Fernando Pessoa

João José Santos
tradukis el la portugala



TRIA – LA DEZIRATO

Kie ajn, inter ombroj kaj diraĵoj,
kuŝu vi for, saŭdadon nian sentu
kaj leviĝu de l' fundo de l' malesto
por destin' via nova!

Venu, Galahad' ¹ kun patri', relevu,
sed jam en l' apoge' de l' prov' plejalta,
l' animon pian de via popolo
al l' Eŭkaristi' Nova.

Paca Majstr', levu vian sanktan glavon,
Ekskalibur' ² de la Fino, tiele,
ke ĝia Lum' al l' mondo dividita
montru la Sanktan Gralon ³ ! Ω



La Sankta Gralo, Arthur Rackham, 1917.

1 Galahado: kavaliro de Reĝo Arturo, kiu vidis la Sanktan Gralon. Legu:
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Galahad>

2 Ekskaliburo: estis la legenda glavo de Reĝo Arturo. Legu:
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Ekskaliburo>

3 Sankta Gralo: estas la fama kaliko el la legendo de la Reĝo Arturo, kiu laŭŝajne enhavis la sangon de Kristo. Legu:
http://eo.wikipedia.org/wiki/Sankta_gralo



**Francisco Stefano
Wechsler**
tradukis el la portugala

Majstro (Odo 1)

de Rikardo Rejszo (Fernando Pesoo)


Majstro, serenaj
Estas la horoj,
Kiujn ni perdas,
Se, dum la perdo,
Kvazaŭ en vazon,
Metas ni florojn.

Ne estas ĝojoj,
Nek korĉagrenoj
En vivo nia.
Tial ni sciu,
Saĝe naivaj,
Ne vivi l' vivon,

Sed ĝin traflui,
Trankvilaj, pacaj,
Kun infanetoj
Kiel vivmajstroj,
Kaj kun l' okuloj
Naturoplenaj...

Apud rivero,
Apud irvojo,
Laŭ la okazo,
Ĉiam en sama
Milda ripozo
Esti vivanta.

Tempo forpasas,
Diras nenion.
Ni maljuniĝas.
Ni sciu senti,
Preskaŭ malice,
Nian forfluon.



Saturno, Karavaĝo.

**La tempo-dio Saturno, aŭ Krono, manĝis siajn
filojn. Efektive la tempo ĉion voras.**

Ja vanas gesti.
Oni ne povas
Kontraŭbatali
Dion kruelan,
Nepre manĝantan
Sian idaron.

Ni pluku florojn.
Trempetu l' manojn
Ni en riverojn
Milde trankvilajn,
Por lerni fine
Ankaŭ trankvilon.

Sunfloroj ĉiam
Sunrigardantaj,
Vivon forlasos
Ni pacanime,
Sen eĉ la pento,
Ke ni travivis. ☉



el *Iliado Latina* anonima

Gerrit Berveling
tradukis el la latina

Dum pluraj jarcentoj, *Iliado Latina* estis la sola formo, en kiu la kulturitaj rondoj de okcidenta Eŭropo povis koni Homeron: ja la Grekan lingvon oni post la klasika periodo ĉiam malpli kapablis legi, se escepti ĉiugeneracie eble du-tri strangulojn ekster la ĝenerala fluo de l' kulturo. Kaj *kompleta* traduko en la Latina tute ne ekzistis.

Iliadon Latinan tradicie oni transdonis sub aŭtoreco de Homero (*Homerus*) aŭ de Pindaro Teba (*Pindarus Thebanus*). Tiu lasta indiko nepre devas baziĝi je miskompreno, kiun ni ne plu konas. La origina Pindaro ja tute ne verkis epopee!

Kiel ajn, ĝis 1857 *Iliado Latina* aperis kutime sub unu el tiuj ĉi (ne-oblaj) aŭtor-indikoj, kio fakte enreale similis je anonimeco. Sed depost tiu jaro pluraj, precipe Germanaj filologoj, sed ankaŭ alinaciaj, klopodegis por malkovri, kun ioma certeco, la eventualan originan aŭtoron. Oni hipotezis pri Jozefo Iskano (*Joseph Iscanus*), Avieno (*Avienus*), Silio Itala (*Silius Italicus*), Atio Labeono (*Attius Labeo*), Persio Flako (*Persius Flaccus*), Polibio (*Polybius*) kaj multaj aliaj...

Nuntempe la plej ofte renkontata supozo estas, ke verkis ĝin certa Publio (?) Bebio Itala (Publius? Baebius Italicus, ĉ. 49 - ĉ. 93 p.Kr.). Plej verŝajne la epopeeto de 1070 versoj devas esti junaĝa verko, kiun la aŭtoro, kiu poste ne plu verkis ion atentindan, probable kunmetis ĉirkaŭ 65 p.Kr. Vere grandiozan poeziecon bedaŭrinde la verko ne havas. Tamen, kiel dirite, pro ĝia influo ĝi estas koninda.

Se paroli pri Homero kaj la frua-Grekaj epopeoj je lia nomo, *Iliado* kaj *Odiseado*: en okcidenta Eŭropo mezepoke oni verkis plurajn nacilingvajn «romanojn» pri tiu tem-ciklo. Por citi nur unu faman: *Le Roman de Troie* de Benoît de Sainte-Maure, el ĉ. 1165.

Kiel bazon por tio la tiutempaj aŭtoroj uzis du prozajn Latinajn verkojn: temas pri la t.n. *Taglibro pri la Troja Milito* – Ephemeras Belli Troiani, el la 4-a jarcento, nome de Diktiso Kreta (*Dictys Cretensis*), kiu traktas la historion el Greka flanko, kaj *Historio pri la Pereo de Trojo* (Historia de excidio Troiae) el la 6-a jarcento, nome de Dareso Frigia (*Dares Phrygius*), kiu traktas la aferon el Troja vidpunkto. Ambaŭ Latinaj verkoj estas grandiozaj mistifikaĵoj.

Iliado Latina donas heksametran resumon de la Homera epopeo.

El ĝi do jen kelkaj fragmentoj:

La temo¹

Iom rakontu al mi, ho Diin', pri Pelida² venĝemo:
 Tristajn funebrojn ĝi kaŭzis al multaj Grekoj mizeraj,
 Ankaŭ fortajn heroo-animojn al Orko³ donacis,
 Lasis hundojn bojantajn kaj birdojn rabe disŝiri
 5 Ilin mem, ĉi kadavrojn sensangajn, senajn je tomboj.
 Ĉar nur jen plenumiĝis decid' de la Reĝo Plejsupra⁴
 [depost kiam]⁵ kverelo dispelis la korojn de l' fortaj
 Sceptroportanta Atrid⁶ kaj milite fama Aĥilo.



¹ La komencaj versoj akrostike enhavas la nomon *Italicus*. La tute lastaj versoj same akrostike entenas la Latinan vorton *scripsit* = skribis. Jen ege magra aŭtorindiko.

² La Pelido = Aĥilo.

³ Dio de la Subterejo.

⁴ Jovo.

⁵ Teksto difektita.

⁶ La Atrido estas Agamemnono aŭ, alifoje, ties frato Menelao.

La militkaptita filino de pastro Ĥrizeo

- Ho kiu Dio en trista koler' ordonis batali?
 10 – Estis la fil' de Jov' kaj Latona⁷! Ĉar li al Pelasga
 Reĝ⁸ pereigan am-morbon metis rekte enkoren,
 Kaj la Danaojn korpe li epidemie infektis.
 Foje Ĥrizeo, kun sanktaj bendoj ĉirkaŭtempie,
 Venis lamenti pri sia subten', la rabita filino,
 15 Kaj li malbenis la tagojn, malbenis la tempon de l' nokto.
 Per siaj plendoj senhaltaj l' aeron li daŭre plenigis.
 Ĉar la tempo pasanta al kor' malpeziĝon ne donis,
 Kaj neniu konsol' faciligis la larmojn de l' patro,
 Li kampadejon Grekan vizitis, Atridon suplikis
 20 Kaj mizerplene priĵuris tiun je l' Dioj, je l' Indo,
 Ke la filinon (kialon por vivi) al li li redonu.
 Donojn samtempe prezentas. – Venkiĝis de lia plorado
 La Mirmidonoj⁹, decidas redoni al li Ĥrizeidan.
 Sed la Atrido rifuzas, devigas Ĥrizeon foriri
 25 El kampadej', hontigite malinde: sovaĝa amor' lin
 Rongas intime, malŝatas la preĝojn damninda libido.
 Feban templon aliris post tiu insulto la pastro
 Kaj perunge striigas al si lamente la vangojn,
 Ŝiras la harojn kaj batas tempiojn grizajn pro aĝo.
 30 Kiam ekĉesis ĉi plendoj kaj rekvietiĝis la larmoj,
 Per ĉi vortoj la Dion profetan li jene alvoĉis:
 «Kiom utilas, ke via Diec', Apolono, kultiĝis
 Aŭ ke dum multe da jaroj ĉastan vivon mi vivis?
 Kiom utilas, ke sanktajn fajrojn altaren mi metis,
 35 Se malamiko fremda min – vian pastron – malŝatas?
 Jen, ĉu ĉi *via* regal' por mia soleca oldeco?
 Se por vi mi valoras, ĉe via ŝirm' mi sekuru,
 Aŭ se senscie mi iel meritis punon suferi
 Pro terura akuzo, – do kial ne *vi* mane batas?
- 40 Prenu la sanktan pafarkon, direktu al mi viajn sagojn:
 Tiam klare mi mortos per mano de l' Dio. La patron
 Trafu, se kulpan. Ĉu pagu filin' pro la pekoj de l' patro
 Kaj suferu – ho povra – la liton de aĉa fiulo?»
 Diris li. Kaj instigite de l' peto de sia ĉi pastro
 45 Trafis suferi Danaojn la Di' kaj dissendis la peston
 Inter ĉi tutan amason: ĉie faladis la Grekoj;
 Pene sufiĉis la spac' por la rogoj¹⁰, l' aer' por la flamoj,
 Mankis grundo por tomboj. Jam pasis steloj de l' nokto
 50 Naŭa, la deka aŭroro larĝe malŝlosis la mondon,
 Kiam la Grekan eliton Aĥil' asembleen kunvokis:
 La Testoridon tie li petis klarigi la kaŭzojn
 De ĉi epidemie. Kalĥaso¹¹ konsultis la Diojn



7 Apolono, alinome Febo.

8 La Atrido Agamemnono. Pelasgoj, Danaoj kaj Aĥivoj indikas Grekojn.

9 La popolo / soldatoj de Aĥilo.

10 Rogo – brulŝtiparo uzata ĉe laŭrita sepultado. Oni poste enterigis la cindrorestaĵojn.

11 Filo de Testoro. Profeto, divenisto.

- Kaj malkovris samtempe la fonton kaj ĉesigeblecon
 55 De l' katastrof', sed timante eldiri, sub ŝirm' de Aĥilo
 Fine li diris: «Febo koleras. Do lin ni pacigu
 Kaj Ĥrizeidan ĉastan al pia patro resendu,
 Se ni Danaoj deziras atingi savan havenon.»
 Diris li. Tuj ekflamis la koleriĝemo de l' reĝo.
 60 Li lin titolas mensoga, la grandan Aĥilon kulpigas
 Kaj siavice ties riproĉojn li same suferas.
 Ĉiuj terure tumultas. Fine, post ĉeso de l' bruo,
 Kontraŭvole kun peno li devas forsendi l' amatan
 Kaj Ĥrizeidan integran al pia patro redoni
 65 Kune kun multa donaj'. Ĝin la ĉiekonata Ulikso¹²
 Metis sur poŭpon kaj al la patra kastelo transportis
 Kaj de tie li velojn al floto Danaa direktis.
 Tuj repaciĝis la Dia potenc' de l' minaca Febo
 Kaj al l' Aĥivoj kaj fort' – konsumita preskaŭ – revenis.

Agamemnono ne povas forgesi Ĥrizeidan

- 70 Sed la Atrid' Ĥrizeidan sopiron ne povis sufoki:
 Li `stas trista, priploras trompita perditan la amon.
 Baldaŭ li rabe forprenas de l' granda Aĥil' Brizeidan¹³
 Kaj ĉe knabin' aliula pri propra perd' konsoliĝas.
 Sed feroce, kun nuda glav' Eakido¹⁴ aperas
 75 Kaj l' Atridon atakas kaj, se li ne predon militan
 Tuj redonos honore, minacas l' alian per morto.
 Sed siaflanke ĉi pretas sin glave forte defendi.
 Kaj se ne ĉasta Atena permane Aĥilon retenus,
 L' amo blindiga por ĉiam kaŭzus por gento Argosa
 80 Egan misfamon. Jen malŝatante minacojn kaj vortojn
 La Peleido alvokas la Dian patriron¹⁵ marbluan,
 Ke la insulton de l' Plistenid'¹⁶ ŝi ne lasu senvenĝa.
 Sed Tetisa, aŭdante la preĝon de l' fil', elondiĝas
 Kaj Mirmidonan tendejon vizitas: Per sia man' li
 85 Glavon ne tuŝu, kaj ne plu batalu! Poste tra nubojn
 Alte eterajn rekte ŝi flugas al ora ĉielo.



12 Odiseo.

13 Filino de Brizeo, militkaptitino de Aĥilo.

14 Aĥilo, laŭ nomo de la avo.

15 Tetisa.

16 Agamemnono.



Yohanes Manhitu

**Yohanes Manhitu**

<http://ymanhitu.blogspot.com>

<http://ymanhitu-poemoj.blogspot.com>

estas indoneziano naskiĝinta la 24-an de majo 1976, en la vilaĝo Sunuo, en Indonezia Timoro. Li studis anglalingvan instruadon ĉe la Universitato *Nusa Cendana Kupang*, en Indonezia Timoro (1995-2000). Poste, li laboris unu jaron kiel tradukisto kaj interpretisto ĉe la oficejo de UNHCR en Kupang. Nun li loĝas en Jogjakarto kaj laboras tie kiel verkisto, tradukisto, kaj fremdlingva instruisto. Li verkas poemojn indonezie, davane, tetume, esperante ktp., kaj aktive partoprenas en diversaj literaturaj agadoj. Oni eldonas kelke da liaj indoneziaj poemoj en la ĵurnaloj *Pos Kupang*, *Seputar Indonesia*, kaj en literaturaj retpaĝoj. Krome, kelke da liaj hispanlingvaj poemoj troviĝas en la antologio *Los Poetas y Dios* (León, Hispanio, 2007).

Hodiaŭ estas dimanĉo

Jen estas la vera tago de dia festo kaj oni invitas ĉiujn al la ĝojo proponita al la malsata mondo, al la animoj longtempe sen trinko.

Jen estas la vera tago de dia festo kiam oni forgesas la bruon de laboro revenante minuton al la afero, nin gvidanta tra ĉiela serĉo.

Jen estas la vera tago de dia festo dum kies okazo homoj de koloroj, blankaj, nigraj, ruĝaj kaj flavaj, kunsidas sub la sama tegmento.

Jen estas la vera tago de dia festo kiam ni kune manĝas kun ĝojo, kiam ni kune trinkas kun plezuro el la sama plado kaj la sama taso.

Jen estas la vera tago de dia festo donanta al ni ĉiuj bonan donacon por alporti hejmen kaj ĝin porciigi kun la mondo bezonanta ĝojon. Ω

Sermo uulgaris

Kiam mi parolas al la mondo kvazaŭ mi dirus *urbi et orbi* ¹, mia celtabulo estas kompreno. Kaj mia lingvo estus *sermo uulgaris* ².

Krei miskomprenon estus senutila ĉar ĉiutage ni daŭras tion fari. Oni ĉiam ĵetas novajn brikojn por konstrui murojn de konfuzo.

Nescio estas patrino de danĝero; Miskompreno, frukto de nescio. Do kiam mi parolas al la mondo, mia lingvo estus *sermo uulgaris*. Ω

Signifo de via rideto

Ho, viaj okuloj min rigardis kiam mi ekskribis mallongan vorton en lingvo, kiun vi neniam konis.

Vi min demandis pri kio mi skribis. Kaj vi donis al mi tiun rigardon; grandan scivolemon ĝi signifis.

"Pri amo senlima", mi diris. Vi ridetis sed flustris nenion. Interpreti tiun rideton mi ne povis.

Provi mian amon mi ege volis, sed ni ne havis plenan sezonon. La luno kune kun vi malaperis. Ω

¹ Temas pri latina esprimo, kiu signifas "al la urbo kaj al la mondo". Kiam la papo parolas al la tuta mondo, oni diras tion.

² Popola parolstilo.

Skizo de Lingva Historio de Brazilo ¹

Roberto da Silva Ribeiro

1 – Enkonduko

Nuntempe, plejparte de la brazilanoj havas kiel gepatran lingvon la portugalan. La dua pliparolata lingvo en Brazilo estas la japana, la tria la germana, la kvara la itala. Nur ĉirkaŭ 60 mil homoj parolas ian indiĝenan lingvon, duonon el ili parolas la gvaranian.

La nuna preskaŭ unulingveco de Brazilo jam estis nomita "miraklo" de kelkaj naivaj aŭtoroj, sed tio estas produkto de longa historio.

Ĝis la regado de Markizo de Pombalo (1699-1792) ², kiu estis la ĉefministro de Portugalio de 1750 ĝis 1777, la oficialaj lingvoj de Brazilo estis egale la latina ³, en kiu oni skribis la ekleziajn dokumentojn, la *nheengatu* (ankaŭ nomata "tupia" de la neindiĝenoj) kaj la portugala, uzata ankaŭ por oficialaj dokumentoj de la kolonia estraro. Pombalo igis la portugalan la nura oficiala lingvo de la portugala imperio, kaj malpermesis la instruadon en la indiĝenaj lingvoj. La laŭnorma portugala lingvo, ĝis la tempo de Markizo de Pombalo, estis nur administrantara lingvo de koloniistoj en Brazilo, escepte en kelkaj havenoj, kie estis granda nombro de portugaloj ⁴.

1 Ĉiuj artikoloj de *La Karavelo* elmontras la opiniojn de siaj aŭtoroj kaj tradukistoj, ne nepre la opinion de la redaktisto de LK. (JJS)

2 Legu ĉe *La Karavelo* n-ro 2, p. 18 ĝis 23, elveran rakonton, tradukitan de Eduardo Novembro, kie aperas Markizo de Pombalo. (JJS)

3 La latina estis ĝenerale la lingvo de la eklezio, tamen nur pastroj kaj kelkaj eruditoj ĝin parolis. La lingvo parolata de la portugaloj, en Portugalio, Gvineo, Kaboverdo, Angolo, Santomeo-kaj-Princo, Mozambiko, Sudafriko, Timoro, Barato, Ĉinio, Japanio kaj Brazilo estis ĉiam la sama, la portugala. Tamen, kun la aliaj popoloj, la portugaloj parolis ties lingvojn kaj instruis sian lingvon, la portugalan. (JJS)

4 La lingvoj estas parolataj laŭ la kompetento, edukiteco kaj klereco de la homoj. Eĉ en la nuntempa Portugalio, la portugala prezentiĝas laŭ variaĵoj socitavolaj, klerecaj, homaĝaj, regionaj, ktp.



Pombalo ankaŭ sendis organizitajn grupojn da koloniontoj al kelkaj regionoj de Brazilo, ĉefe al la landinterno kaj al la sudo. Tiuj grupoj formis "insulojn" de portugalingvanoj en la brazila teritorio. La restoj de tiuj "insuloj" ankoraŭ estas rekoneblaj, ĉar ili estas pli arkaismemaj ol la ĉirkaŭantaj areoj ⁵.

Dum la 19-a jarcento, la portugala gajnis terenon, ĉefe pro alveno de la portugala kortego al Brazilo ⁶. En 1808, alvenis ĉirkaŭ 15 mil portugaloj de alta sociklaso al Rio-de-Ĵanejro. Multaj kolonianoj estis tre influataj de la lingvaj uzoj de tiuj 15 mil portugaloj. El Rio-de-Ĵanejro, la laŭnorma portugala iom post iom divastiĝis ⁷.

Same okazis en la kolonio Brazilo: la plej kleraj parolis laŭnorman portugalan, la malpli kleraj parolis ĝin kiel ili povis. Tio okazas en ĉiuj lingvoj kaj kulturoj, eĉ en esperanto. Kompreneble, la portugalia komercisto aŭ la militisto ne parolis la portugalan kiel Pastro Antono Vieiro (legu pri li en *La Karavelo* n-ro 6., p. 10 ĝis 11, artikolo de João José Santos). Ankaŭ la romianaj soldatoj ne parolis la latinan kiel Cicerono. (JJS)

5 La plej granda parto de la plej bonaj brazilaj verkistoj, kiel Maŝado Asiso, verkis (kaj verkas) en portugala lingvo tre simila al la nuntempe uzata en Portugalio. (Pri Maŝado Asiso, legu en *La Karavelo* la artikolojn de Paulo Sérgio Viana, kaj Francisco Stefano Wechsler, en la LK-n-roj 2, 3, 6, 11.) Homoj scipovantaj la portugalan aprezu, ke televidaj ĵurnalistoj el ĉiuj portugallingvaj landoj parolas treege simile la laŭnorman portugalan. (JJS)

6 Legu ĉe *La Karavelo* n-ro 7, p. 20 ĝis 24, historian eseon, de João José Santos, pri la translokiĝo de la portugalia reĝa familio al Brazilo, en 1808, kune kun la tuta portugalia administrantaro, libroj kaj riĉaĵoj. (JJS)

7 Simila fenomeno okazis ĝenerale en aliaj landoj. Portugalio estis konkerita de nekleraj romianaj soldatoj kaj komercistoj, kiuj venigis sian lingvon kaj morojn. En Portugalion tiel envenis la latina, la latina de la malkleruloj, la ordinara latina. Ĉefe en la

Getúlio Vargas (1882-1954), diktatoro de Brazilo inter 1930 kaj 1945, malpermesis en 1942 la instruadon en aliaj lingvoj krom la portugala, eĉ en fremdlandaj komunumoj. Vargas, inspirita de naziismo, kreis lingvopolitikon, laŭ kiu nur tiuj, kiuj scipovas la portugalan, havis civitanajn rajtojn dum lia regado.

La radielsendo kaj televidelsendo dum la 20-a jarcento fine firmigis la rolon de la portugala lingvo en Brazilo.

2 - Indiĝenaj lingvoj

Antaŭ la alveno de eŭropanoj, oni ne scias kiom da lingvoj estis parolataj en Brazilo. Kelkaj aŭtoroj pensas, ke ili estis ĉirkaŭ 400, sed aliaj pensas, ke ili estis pli ol du mil. Ankoraŭ nuntempe estas parolataj ĉirkaŭ 200 indiĝenaj lingvoj en la lando. Do la penso, ke oni parolis pli ol mil lingvojn antaŭ la jaro 1500 ne estas troa. Tiuj lingvoj apartenis al kvar grandaj grupoj, aŭ lingvaj trunkoj, la plejparto al la trunkoj Makro-Gea kaj Kariba. La lingvoj de la tupia familio estis la plej disvastigitaj, kaj la gvarania estis la lingvo plej parolita en tiu teritorio.

La gvarania, aŭ abenheenga, estis la lingvo, kiun la blankuloj unue uzis por kontakti la indiĝenojn. Ĝi evoluis al la piĝino *nheengatu*, kiu rapide iĝis kreola lingvo de Brazilo. Ĝi estas iomete artfarita, ĉar la eŭropaj pastroj skribis gramatikojn kaj lernolibrojn pri ĝi, sekvante la gramatikan nomenklaturon de la latina lingvo kaj provante proksimigi ĝin al la latina⁸. Sekve, ĝi ne estis lingvo apartenanta al iu tribo, sed la unuformigo leksikona de diversaj dialektoj⁹, fiksita de la gramatiko de la pastro José de Anchieta¹⁰ kaj de aliaj jezuitoj. La tupia,

Renasanco, sed ne nur, kleraj portugaloj pli eruditigis la portugalan per vortoj kaj frazkonstruoj el la literatura latina lingvo. (JJS)

8 Manke de indiĝenaj gramatikistoj, la eŭropanoj devis analizi aliulajn lingvojn laŭ sia kulturo, evidente. Eĉ kiam oni klopodas ne influi, la studata objekto ĉiam estas iom influata de la sciencisto. Estas pli science agnoski ke tio ĉiam okazas, pli aŭ malpli, ol pretendi, ke la scienco ĉiam estas absolute rigora. (JJS)

9 Per tiu unuformigo kaj ĝeneraligo, la portugala gramatikistoj ne priskribis la konkretan lingvon de iu tribo, sed alproksimiĝis al pralingvo de kelkaj el ili. (JJS)

10 Pri la Pastro Jozefo Anŝieto, konsultu: http://eo.wikipedia.org/wiki/Jos%C3%A9_de_Anchieta



sekve, estis la rezulto de tiu normiga klopodo por servi al ĉiuj misiistoj en iliaj laboroj. La jezuitoj uzis la tupian en kelkaj vilaĝetoj, normigante la diferencojn ekzistantajn inter la faktoroj de ĉiu tribo, kreante instrumenton de interkomunikiĝo, ĉu inter la diversaj triboj grupiĝintaj, ĉu inter eŭropidoj mem.

Multaj indiĝenaj etnoj lasis siajn lingvojn por uzi la *nheengatu-an* kaj eĉ la eŭropidoj uzis tiun kiel ĉefan lingvon en la landinterno¹¹. La baza edukado estis farata en *nheengatu*, ekcepte en la marbordaj urboj. Fama estis la kazo de Domingos Jorge Velho, kiu ne sukcesis paroli la portugalan al episkopo de Olinda (port.: *Olinda*) kaj bezonis tradukiston¹².

Nheengatu tre influis la brazil-portugalan lingvon, kaj eĉ Esperanto ricevis ian influon de ĝi per nomoj de brazilaj bestoj kaj plantoj, ekzemple "gujavo", "akaĵuo", "jaguaro". La prononco de la brazilanoj ankaŭ

11 Kompreneble, ĉiam kiam la portugaloj trovis indiĝenojn, ili provis paroli kun ili en tiu interetna konstruita tupia lingvo. La portugala estis uzata nur inter portugaloj. Esperanto ankoraŭ ne ekzistis, do oni devis trovi solvojn por la interkompreniĝo, ĉu ne? La solvo trovita de la portugaloj estis multe pli homama, ol la solvo de aliaj popoloj, kiuj tute forigis la etnoj, mortigante ties elementojn por konkeri la teritoriojn. Danke al la portugala maniero esti en la mondo, t.e. la miksiĝo, la brazilanoj nuntempe parolas pri rasa kaj kultura sinkretismo. Se male, la brazila popolo estus formita nur de blankuloj. (JJS)

12 La afero estas rakontata kvazaŭ anekdoto, ĉar evidente estas ege strange, ke portugalo estu perdinta sian denaskan lingvon. La epizodo kompreneble ne pravigas la ideon, ke la portugaloj ne kapablas paroli sian lingvon en Brazilo. Ribeiro sendis ĉi tiun postan klarigon (JJS):

Domingos Jorge Velho estis esplor-soldato (portugale "bandeirante") naskiĝinta en San-Paŭlo. Li komandis la esplorgrupon de San-Paŭlo, kiu atakis multajn indiĝenajn tribojn, fondis Piauijon kaj detruis la sklavrifugejon Palmares-on. Sekve, li ĉiam vivis en landinterno kaj tre malofte kontaktis portugalojn. (RR).

estis tre influata de la *nheengatua*, ĉefe en San-Paŭlo kaj Minas-Ĝerajso ¹³.

Male al la tupiaj kaj al la gvaraniaj grupoj, la geaj grupoj, pro multaj historiaj kaj kulturaj kialoj, malmultege kontribuis al la nuna brazila portugala lingvo. Ilia kontribuo preskaŭ restis en la loknomoj ¹⁴.

Nuntempe, malpli ol 60 mil homoj parolas iun indiĝenan lingvon en Brazilo. La plej granda komunumo, ĉirkaŭ 30 mil homoj, estas la gvaranioj ĉe landlimo kun Paragvajo. Krom tiu, malmultaj lingvoj havas pli ol mil parolantojn kaj estas en danĝero de malapero.

3 - La nigrulaj lingvoj

Dum la kolonia periodo, en la brazila marbordo, oni kredas, ke nur la blankuloj parolis la portugalan lingvon. La nigruloj kaj la mestizoj parolis kreolajn versiojn el la portugala alveninta el Afriko. En Pernambuko, la portugala kreolo estis parolata ĝis la mezo de la 20-a jarcento. En Salvadoro, ĉefurbo de Brazilo en la kolonia tempo, oni parolis ĉefe la afrik-devenan joruban lingvon ĝis la komenco de la 20-a jarcento.

Kiam komenciĝis la komerco de sklavo al Brazilo, ĝenerale oni parolis denaske la hausaa, la joruban kaj la fonan lingvojn. La portugaloj parolis al ili per kreola variaĵo de la portugala lingvo. Kreola lingvo (aŭ tutsimple "kreolo") estas eksa piĝino, kiu ekhavis denaskajn parolantojn. Kreola lingvo, pro apero de popolo ĝin parolanta, povas iĝi sufiĉe riĉa kaj nuancplena ¹⁵. La portugala kreoloj estis la ĉefaj komercaj lingvoj en Afriko kaj Azio, en la 16-a kaj la 17-a jarcentoj, kaj studoj montras, ke en kolonioj de Portugalio, ĝi estis la parolata lingvo anstataŭ la "vera"

portugala uzita nur en skribaĵoj ¹⁶. Estas kelkaj dokumentoj, kiuj montras, ke, en Brazilo, nigruloj kaj mulatoj ne scipovis la laŭnorman portugalan, sed kreolan variaĵon kun forta influo de *nheengatu*.

Krom la afrikaj kreoloj, uzataj kiel interlingvoj de blankuloj kaj nigruloj, kaj kiel gepatra lingvo de mestizoj, la joruba lingvo estis uzata de nigruloj ĉefe en Salvadoro, ĉar ĝi estis tre disvastigita lingvo en Afriko. Ĝis la nunaj tempoj, la joruba estas uzata kiel sankta lingvo de kandombleo en Brazilo. Ĝi estas tona lingvo kaj, pro tio, malfacile influis en la brazila elparolado kaj vortprovizo.

En San-Luiso, Maranjo, nigruloj uzis la fonan lingvon kaj eble en Recife oni parolis la kasanĝan lingvon el Angolo, sed sen grava influo al la lingvaj uzoj de Pernambuko.

4 - Aliaj lingvoj: aziaj kaj eŭropaj

Ĝis 1808, oni malpermesis la eniron de fremduloj en Brazilon, ekcepte de la pastroj kaj la dungosoldatoj. Kvankam estis invadoj de eŭropanoj, ĉefe de nederlandanoj, kiuj regis dum 25 jaroj la nordorienton, preskaŭ ne estis influo de aliaj eŭropaj lingvoj en Brazilo ¹⁷.

Malgraŭ la proksimeco de hispanaj kolonioj, la hispana lingvo influis nur en la sudo de Brazilo, kie, ĝis nuntempe, la elparolado estas iom hispaneca. Escepte de la ĵus enmigrintaj familioj, neniu havas la hispanan kiel patrinan lingvon en Brazilo. Post la dua duono de la 19-a jarcento, kiam la komerco de nigraj sklavo estis malpermesita kaj oni jam antaŭvidis la finon de sklaveco, la brazila registaro stimulis la akiron de eŭropaj kaj aziaj kvazaŭsklavo pro ŝuldoj ¹⁸. Ili estis kamparanoj, ĉefe el Pomeranio, Italio kaj Germanio, kiuj pro mizero akceptis iri al Brazilo. Tiel ili devis akcepti pagi "ŝuldojn".

¹³ Evidente la brazilportugala estis influata de la indiĝenaj lingvoj. Simile la keltaj lingvoj, ekzistintaj en Portugalio antaŭ ol la romia invado, influis la disvolvon de la portugala. Same okazas ĉie. (JJS)

¹⁴ La malplej bone informita leganto sciuj, ke la unueco de Brazilo estis starigata de la portugaloj, ĉar en tiu grandega lando loĝis multaj etnoj en apartaj regionoj. (JJS)

¹⁵ La elportugalaj kreoloj parolataj en Kaboverdo, Gvinebisaŭo kaj Santomeo-kaj-Princo montras, ke la kreoloj estas lingvoj funkciaj kiel la aliaj. Nur la proceso de ilia naskiĝo estas malsama. (JJS)

¹⁶ La portugala estis la lingvo ĝenerale parolata en la portugala imperio. En kelkaj lokoj, ĉefe kie estis sklavo, estiĝis apartaj kreoloj, kreitaj de la sklavo. Jen restas ĉi tie ambaŭ vidpunktoj, ĉar *La Karavelo* estas demokratiema revuo. (JJS)

¹⁷ Kompreneble, la portugaloj protektis sian kolonion kontraŭ la apetitoj de la aliaj eŭropaj landoj. (JJS)

¹⁸ La sendependeco de Brazilo okazis en 1822. Ĝia unua imperiestro estis la portugala reĝo Don Petro La 4-a, kiu estiĝis Don Petro La 1-a en Brazilo. Dum larĝa periodo, li estis samtempe reĝo de Portugalio kaj imperiestro de Brazilo. (JJS)

Tiuj originaj "ŝuldoj" estis ĝenerale rilatantaj al la vojaĝbileto kaj al la impostoj de la devenlandoj. Poste ili devis pagi manĝadon kaj pruntojn al la terposedanto ¹⁹. Ankaŭ libera enmigrado estis stimulita, kaj al tiuj oni permesis havi lernejojn kaj preĝejojn en sia propra lingvo.

Male al germanoj, italoj preferis vivi en urboj kaj multaj iris labori en industrio de San-Paŭlo. Ĉirkaŭ la jaro 1950, laŭdire, la italparolantoj en tiu urbo estis pligranda ol la longantaro de Romo. La itala lingvo tre influis la portugalan de la urbo San-Paŭlo, elparolade, vortprovize, morfologie kaj sintakse ²⁰.

En 1908, komenciĝis la alveno de japanoj al Brazilo. Kompreneble, ĉar ilia lingvo estas tre malsimila al la portugala, ĝia influo restis nur en kelkaj vortoj.

Dum la 1930-a jardeko, Vargas malpermesis la instruadon en fremdaj lingvoj, kaj post 1942, kiam Brazilo deklaris militon al Akson (Germanio, Italio kaj Japanio), estis malpermesata la parolado en la germana, en la itala kaj en la japana lingvoj, sekve ĉiuj parolantoj de tiuj lingvoj devis lerni la portugalan. Ankaŭ oni malpermesis la radielsendon kaj televidelsendon en fremdaj kaj indiĝenaj lingvoj, sekve, radio kaj televido nur povis elsendi en la portugala.


5 – Konkludo

Nuntempe, en Brazilo, la portugala estas lingvo de 180 milionoj da brazilanoj, kontraŭ 300 mil denaskaj parolantoj de aliaj 200 lingvoj. Ĉi tiu kadro havis malrapidan evoluon. Unue la portugalparolantoj estis malmultaj en la havenoj kaj vilaĝoj, en kiuj oni ankaŭ parolis aliajn lingvojn, indiĝenajn, afrikajn aŭ kreolan ²¹.

¹⁹ Ĉiuj formoj de sklaveco estas kondamnindaj. En Afriko, kelkaj etnoj ĉasis homojn el aliaj etnoj por vendi ilin al la portugaloj kaj al aliaj eŭropaj landoj. Sed, la fakto, ke en la brila Eŭropo de la 19-a jarcento, homoj estis vendataj, far siaj propraj sampatrianoj, pro ŝuldoj, tio ja eĉ pli furiozigas iun ajn decan homon. (JJS)

²⁰ La neportugallingvano ne pensu, ke la portugal-lingvanoj ne interkompreniĝas. Tiaj malsamaj estas fakte minimumaj. La pruvo estas ke, en la nunaj tempoj, alvenas al Portugalio brazilanoj el ĉiuj brazilaj regionoj, kaj la portugaloj tre bone komprenas ilin, kvankam ili nur komprenas nin post kelkaj tagoj de loĝado en Portugalio. (JJS)

²¹ Oni komprenu, ke ne nur la portugaloj estis



Mapo pri la danĝera situacio de la indiĝenaj lingvoj en Brazilo.

La ĝeneraligo de la portugala lingvo en Brazilo estis rezulto de lingvaj politikoj ²², ofte diktatorecaj, komencitaj dum la 18-a j.c. kaj plenumitaj dum la 20-a j.c. Tio ne malsamis al la ĝeneraligo de naciaj lingvoj en aliaj landoj, kiel Francio, ekzemple, dum la sama periodo.

La literaturo kaj la lernado forte kontribuis, kiel en aliaj landoj, por la stariĝo de la portugala kiel nacia lingvo de Brazilo kaj, ankaŭ kiel en aliaj landoj, la radi- kaj televid-elsendoj, en la ŝtata lingvo, helpis la lingvan unuformigon dum la 20-a j.c.


Nuntempe, ankaŭ kiel en aliaj mondpartoj, minoritataj lingvoj estas denove ŝatataj kaj estas movadoj por konservi kaj revigligi ilin, kvankam tiuj movadoj en Brazilo apenaŭ ekzistas. Ω

malmultaj en Brazilo, en la tempo de la brazila malkovro. Ankaŭ la indiĝenoj ne estis multaj. (JJS)

²² La aŭtoro nur mencias politikajn kaŭzojn en la disvastigo de la portugala en Brazilo. Esence la brazilanoj estas la idoj de tiuj portugaloj, kiuj koloniis tiun teritorion, kaj kiuj miksiĝis kun la indiĝenoj kaj kun la nigruloj. En virtoj kaj difektoj, mi ne vidas grandajn diferencojn inter portugaloj kaj brazilanoj. (JJS)



Imre Szabo



La koro

Mi promenas tra la vesperkrepusko
kun manpleno da steloj por ŝuti ilin,
se venos la nigra nokto.

Mi sternos ilin por la sonĝoj,
ĉar revoj tie jam ne plu estas.

La koro restas plej longe,
ĉar la koro persistemas.
La koro ardas ankoraŭ, malgranda purpur-pugno,
kiam la korpo jam forcindriĝis.

La koro estas birdo neforlasema sian neston:
la cindrojn,
ĝi sidos tie iom ankoraŭ
dum la flamlavango,
kaj fine ankaŭ ĝi forflugos
miksante sin en la flugilplumojn
de la tempo, ĉi-eterna vento. Ω



Geraldo Mattos
www.gmverda.com.br



Timema

Kelkaj avinoj neniam estas avinoj, ĉar la patrinoj de iliaj genepoj estis nur iliaj filinoj, kies infanoj estas sole nur hazarde iliaj, sed avangarde de iliaj patrinoj... Avinoj estas sufiĉe egoismaj kaj diktatoraj, por sin montri optimismaj kaj nep-adoraj en tia grado kaj degrado, ke la penegoj de la veraj patrinoj estas vanaj kaj volanaj.

Unu el tiaj avinoj neniam trinkis guton da vino, kvankam ŝi estis portugalingo, sed pli efika ol pokalo da vino... Ŝi ŝuldis al la Ĉielo gravan helpon, pri kiu ŝi ĉiam sekretis, kaj tre bona negocistino, ŝi preferis, ke ĝin pagu ŝia nepo... Li naskiĝis, sed ŝi havis pli grandan paciencon ol la longeco de la jaroj... Kaj pasis la tagoj, kaj pasis la semajnoj, kaj pasis la monatoj, kaj pasis la jaroj, kaj la avino de Geraldo ekvidis, ke jam temp' está:

– Geraldo nun devas iri al seminario, pli bone: al franciskana seminario por fariĝi pastro, franciskana pastro de la ordeno de la fratoj minoraj: OFM! [latine: *ordo fratrum minorum*]

Kaj la vivo plu kuris serĉe al la estonteco.

Kaj pasis la tagoj, kaj pasis la semajnoj, kaj pasis la monatoj, kaj pasis la jaroj, kaj la avino de Geraldo ekvidis, ke jam temp' está:

– Geraldo nun devas iri al seminario, pli bone: al franciskana seminario por fariĝi pastro, franciskana pastro de la ordeno de la fratoj minoraj!

Neniu demandis la knabon, ĉu li volas esti pastro, sed li mem neniam diris, ke li ne volas esti pastro. Efektive, post la ripeto de tia lia estonteco dum tiom da jaroj, eĉ li mem kredis, ke li naskiĝis nur por esti pastro...

Ili estis tre malriĉaj, sed la avino propetis por la konstruo de la kapelo kaj havis amikojn tie kaj precipe en la granda kaj bela Rio, tiama ĉefurbo de Brazilo.



Seminario

Ĉiuj helpis ŝin per monoj kaj vestoj, kaj unu tagon la surprizata Geraldo vidis sin en la trajno de la Centra Fervojo de Brazilo, kiu kuris de Rio al San-Paŭlo por la plenumo de promesita promeso de sia avino.

Li devis salti en la mezo de la vojo, sed estis multaj aliaj seminarianoj, pardonu! estontaj seminarianoj en la sama vojaĝo, kiun la pastroj organizis.

Frato Didimo ilin akompanis kun atentaj rigardoj al unu post alia, kaj nenio okazus sen lia tuja interveno.

Geraldo estis silenta knabo, iom timema kaj ĉiam enmemiĝema, sed li atente sekvis la konversacion de siaj kunseminarianoj, pardonu! estontaj kunseminarianoj, kiam io ekstera turnis lian atenton:

La trajno komencis kuri preter larĝa rivero, kaj en ĉiu kurbo eĉ ŝajnis, ke la trajno iros rekte sur la mezon de la rivero: frostoj en la ventro de ĉiu kunseminariano, pardonu! estonta kunseminariano.

La ektimo tuj foriĝis, kiam ĉiu vidis, ke ne tien falas la trajno por la plej granda konsolo de ĉiuj, sed memoro ne helpis:

Jam ĉe la venonta kurbo ĉio ripetiĝis, eĉ la posta mallonga trankviliĝo!

Kelkaj el la kunseminarianoj, pardonu! estontaj kunseminarianoj eĉ faris ludon el tiuj novaj haltoj kaj saltoj sur la benkoj de la vagono. Ili fermis la okulojn kaj kriis. Gajnas tiu, kies krio dumas kun la komenco de la kurbo:

– Nun!...

La trajno sekvis la kurbojn de Rivero

Paraibo dum tre longaj horoj, kaj la ludo fariĝis seninteresa, sed la konversacio revenis al ĉies buŝoj. Unu el la pastrigontaj pasaĝeroj rimarkis la silenton de Geraldo kaj diris al li:

– Kion vi pensas pri tiu rivero, kiu akompanas nian trajnon?...

Iom balbute Geraldo korektis la demandinton:

– Mi pensas, ke la trajno akompanas la riveron, precipe ĉar ĝi bezonas akvon por sia moviĝo kaj fajron por sia varmigo, kaj do ne la rivero akompanas la trajnon. Eble pro tio, ni nomas ĝin per nomo kaj postnomo: Maria Fumanta...

Tio tamen estis la plej longa frazo, kiun Geraldo iam diris, kiam li malfermis sian buŝon por akompani konversacion...

La demandinto ridis, kaj sin ne bridis:

– Vi estas sprita, sed vi konas nenion pri riveroj.

Nun la estonta seminariano havis sian kutiman temokampon, kaj eĉ amike gestis al lia estonta kunseminariano:

– Tiun riveron mi povus facile transiri...

Ĉiuj ridis pri tiu 11-jara infano, kiu volis transiri riveron pli larĝan ol kvin longaj vagonoj:

– Transnaĝi tiun longan riveron!...


En tiu momento la 11-jara knabo faris sian unuan teruran mispaŝon: li diris nenion por klarigi, kion li volis diri.

Li memoris pri la pluraj okazoj, kiam li iris al la riveroj de la Riana malaltaĵo, granda ebenaĵo inter la apudmara Rio kaj la surmonta Petropolo, la urbo de la antikvaj imperiestroj de Brazilo. Tie kun sia avo kaj baptopatro li remis en la boateto por helpi lin, kiam ili fiŝkaptis en la riveroj, kiuj fluas al la proksima maro: ĉiu el ili estis tiel granda kiel tiu rivero, kiun la trajno preteriras.

Li ne pensis transnaĝi, sed transremi...

La vojaĝo finiĝis, kaj buso portis ilin al la Seminario de Frato Galvano, nun la unua Brazila Sanktulo.

Kaj komenciĝis la seminaria rutino: leviĝo de sur la lito je la sesa por sin lavi kaj sin vesti, meso je la sesa kaj duono, matenmanĝo je la sepa kaj duono, lecionoj inter la oka kaj la dek-dua de lundo al



sabato, agrabla horo de la tagmanĝo, laboro ĝis la dek-kvara, libertempo ĝis la dek-sesa, deviga studo de la dek-sesa ĝis la dek-oka, vespermanĝo je la dek-oka, deviga studo de la dek-naŭa ĝis la dudek-unua, kaj lito je tiu horo, krom kelkaj minutoj por sin lavi kaj sin vesti.

Dimanĉo estis ĉiam angore atendata: mateno libera por sportoj kaj posttagmezo kaj vespero egala al la ses antaŭaj tagoj, sed kun unu sola grava diferenco: ne deviga, sed libera studo. Ĉiu el la seminarianoj povis desegni, legi aŭ skribi, sed estis kvar dimanĉaj horoj en tomba silento, ho ve, mi mensogas: ne tomba, ĉar ni aŭdis paĝon turniĝi sur paĝon...

Unu el la agrablaj laboroj estis porti ĉaron da tero por ebenigi valon antaŭ la enirpordo de la Seminario: por la pago seminariano ricevis bildeton de sanktulo por ĉiu laborata horo...

Geraldo preferis labori ene de la oranĝejo en la malantaŭo de la Seminaria konstruaĵo, ĉar tion li tre bone konis: la domo de lia avo kaj bapĉjo estis ĉirkaŭita de oranĝarboj, ĉar la restanta grundo estis priplantitaj de tiuj arboj. Lia avo kaj bapĉjo kaj li mem vidis ilin kreski, kaj ĉiun dimanĉon ili iris tien por ilin prizorgi kun amo kaj flamo.

Tion saman li adoris fari en la Seminaria fruktoĝardeno kaj post ĉiu oranĝarbo li vidis la ombbron de sia avo kaj bapĉjo...

Sopiro estas vojo al deliro per aspiro.

La seminarianoj povis resti sub ili, preni maturan oranĝon, ĝin deŝeligi kaj ĝin manĝi per malrapida gustumado. Kaj neniu forgesis porti la ŝelojn al unu el la apudaj rubujoj:

neniu rajtis malpurigi la fruktoĝardenon!

En unu el la postaj sabatoj la seminarianoj havis grandan surprizon, kiam finiĝis la ĉiutaga dekminuta lego de kelkaj paĝoj de aventura libro, kiun faris bona leganto inter la seminarianoj, tuj post kiam la pladoj jam estis sur la tablo por la tagmanĝo. La rektoro, tiel nomiĝas la seminariestro, atendis la finon de la librolego por anonci tre bonan novaĵon:

– Nia naĝejo jam estis konstruita. Nun fine ĝi estas konstruita kaj preta por nia naĝado: ĝi estas simpla malaltaĵo, kiun ni disigis de la rivero, sed ĝi neniam sekiĝas. Tre malprofunda ĝi estas ĉe ĉiu bordo, kaj la plej malalta el vi tie povas stari sur siaj piedoj.

Li faris rigidan vizaĝon: por insisti pri la seriozeco de la informo, kiun ĉiu devas bone memori:

– Atentu, ke nur bonaj naĝantoj iru al mezo de la naĝejo: tie viaj piedoj neniam atingos ĝian fundon... Kaj bone memoru tion, ĉar akvo de naĝejo tute ne estas bona limonado!

Li ridis, sed neniu el la seminarianoj...

La sekvanta punkto estis la plej longa punkto de ĉiuj seminarianoj en tiu Seminario: la sekundoj estis minutoj, la minutoj estis horoj kaj la horoj estis angoroj...

Ankaŭ Geraldo ne sukcesis kalmigi sian internan tempeston: la unuan fojon li irus al naĝejo.

Fine alvenis la dimanĉa mateno kaj la suno koloris pli verdaj la kampojn kaj pli gajaj la vangojn de la seminarianoj.

Ili tamen sentis, ke la meso estas pli longa, ke la mantenmanĝo estas tre longa, kaj ke fine ankaŭ la vojo al la naĝejo estas tro longa. Kvankam tio, estis la unua fojo, kiam ili ĝin tretis per rapidaj kaj decidaj piedoj...

Ĉiu alveninto, escepte de Frato Didimo, sin ĵetis al la akvo: kelkaj rekte al la mezo, sed plej multaj kun la mano sur la bordo de la naĝejo.

Geraldo restis tute sola sur la rando de la naĝejo, ĉar Frato Didimo ne povus esti kalkulata: li ne estis seminariano.

Unu el la seminarianoj supreniris de la naĝejo, sin direktis al la sola knabo tute seka

kaj per insida kaj rapida forpuŝo lin ĵetis en la akvon.

La terurita Geraldo trinkis iom da akvo, sed sukcesis piediri kaj teni siajn manojn sur la rando de la naĝejo. Kaj li tremis de timo kaj de malvarmo, sed multe pli de la unua ol de la dua...

La tuta naĝejo konverĝigis sur la statuan knabon siajn fajfojn kaj siajn ekkriojn kaj siajn ridegojn. Eĉ Frato Didimo aliĝis al la fajfoj, al la ekkrioj kaj al la ridegoj, ĉar li estis nur homo, ne Sankta Antono, kiu subite donis al Geraldo la sufiĉan forton por elteni tian svarmon da insultoj, kiujn lia timema personeco certe meritis.

La knabo restis silenta kaj atenta: li ne ploris, sed lin doloris la voĉoj de kelkaj, kiuj fariĝis liaj amikoj. La restantoj estis restaĵo.

En tiu momento nubo da voĉoj atingis la ĉielon, kaj mutigis la fajfojn, mutigis la ekkriojn, kaj mutigis la ridegojn:

...

– Li ne scias naĝi...

– Li ne scias naĝi...

– Li ne scias naĝi...

– Li ne scias naĝi...

– Li ne scias naĝi...

...

Geraldo tamen supervivis... Ω






UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1908



4-a Universala Kongreso de Esperanto

Djalma Pessata


**Loko:** Dresdno, Germanio**Dato:** 16-a ĝis 22-a de Aŭgusto**Aliĝintoj:** 1500

Dum la kvara UK, la **Konstanta Komitato de l' Kongresoj** (KKK) estis reorganizita. Ekde tiam la KKK konsistis el du membroj de la OK de la antaŭa kongreso, du membroj de la aktuala, du anoj de la venonta, unu prezidanto kaj unu ĝenerala sekretario, ambaŭ elektitaj de la kongreso mem. La reorganizo evidente celis faciligi la organizajn spertojn de unu kongreso al la alia. Estis ankaŭ aprobita la fondo de **Kongresa Kaso**, kies celo estis centri ĉiujn elspezojn rilate la kongreson, enspezi la kotizojn, donacojn, subvenciojn ktp. La Loka Komitato povis esti rajtigita de la KKK fari mem difinitajn elspezojn. La profitoj de la antaŭaj kongresoj povis esti, laŭ la decido de la LK, uzataj por pagi eventualajn deficitajn aŭ


konservitaj por helpi venontajn kongresojn.



La kongresanaro en Dresdno



En la sama jaro de la kongreso, **Universala Esperanto Asocio (UEA)** estis kunfondita de **Hector Hodler** (foto dekstre) kaj Edmond Privat.



TEATRAĴOJ PREZENTITAJ EN LA 4-A UK

► **Ifigenio en Taŭrido**, de **Goethe** (foto maldekstre), la unua prezento de dramo en Esperanto fare de profesiaj aktoroj.

► **Fraŭlino Julia kaj Pario**, de Strindberg.

► **La Malfeliĉuloj**, de Von Kotzebue, kun la partopreno de **Felikso Zamenhof** (foto dekstre), frato de D-ro Zamenhof.



LA 4-A UK KAJ "AMIKEJO"



En la 4-a UK oni pridiskutis kreadon de neŭtrala ŝtato, kies oficiala lingvo estus Esperanto. Kie?

Moresnet estis malgranda triangulo da tereno (3,5 kvadratkilometroj) en la punkto kie la landlimoj de Belgio, Nederlando kaj Germanio renkontiĝas. Post la falo de Napoleono, la fama "Traktato de Vieno", en 1815, decidis, ke Moresnet (kie estis zinkominejo ekonomie grava) ne apartenos al iu ajn regno kaj estos neŭtrala.

En la fino de la XIX-a jarcento, la ekspluatado de la zinkominejo ĉesis. La loĝantoj de Moresnet timis perdi sian "sendependecon".

Grupo da francaj esperantistoj ekhavis la ideon fari el Moresnet ian neŭtralan ŝtaton. Do, en la 4-a UK, ili instigis, ke esperantistoj el la mondo aĉetu terpecojn en la malgranda "ŝtato", kiu nomiĝus "**Amikejo**". Ili kreis kurson por instrui E-on al la loĝantaro, kreis Flagon kaj eĉ "nacion" himnon por

"Amikejo".


La projekto ne sukcesis, ĉar okazis la unua mondmilito. Germanio invadis kaj Belgion kaj kompreneble la etan tertriangulon. Post la milito Moresnet estis aneksita de Belgio. La neŭtraleco de tiu loko daŭris de 1816 ĝis 1919.

Nuntempe, la eksa neŭtrala tereno nomiĝas france "La Calamine", germane "Kelmis".

PRI LA 4-A UK, ĈU VI SCIIS, KE...

►... la Alta Protektanto de la UK estis la saksa reĝo **Frederiko Aŭgusto la 3-a** (foto sube maldekstre), kiu "dankis pro la honoro kaj bonvenigis la partoprenantojn"?

►...la Universala Kongreso de 1908 estis la unua, kiun partoprenis registaraj reprezentantoj, inter kiuj estis Ŝimura (Japanio), Straub (Usono), Yemans (Filipina registaro), Pujula (Barcelono), krom Adolphe Moynier (oficiala delegito de la internacia komitato de la Ruĝa Kruco) kaj **Gaston Moch** (foto sube dekstre), oficiala delegito de la Internacia Oficejo de Paco?



►...la germana reĝisoro **Emanuel Reicher**, post la prezento de *Ifigenio en Taŭrido*, ricevis leteron de la germana imperiestro **Vilhelmo la 2-a**, kiu antaŭe opiniis, ke Esperanto uzeblas nur por anoj de latinidaj lingvoj sed ne por germanoj, sed intertempe venis al la konvinko, ke Esperanto estas efektivebla ĉie? Ω



Foiro de la Lernejoj de Estremozo



La evento efektiviĝis en "Parque de Exposições" (Parko de Ekspozicioj), kiu konsistas el tri grandaj pavilonoj kaj ekstera spaco. Ĝi estas bela montrejo, kie la kulturaj organizoj prezentas sin. Unuafoje tie aperis budo kun la nomo "La Karavelo - Esperanto". Ĝin vizitis anonimaj popolanoj, sed ankaŭ konataj individuoj el la loka kaj nacia povoj. Babiloj, prezentoj kaj argumentoj... Jen bona maniero montri al la vizitantoj, ke esperanto plu vivas. La kontaktoj jam malfermis pordojn al esperanto. Ω

João José Santos
tekstoj kaj fotoj







↑ Supra rando de la budo
"La Karavelo - Esperanto"

↔ Ĝenerala aspekto de la budo
"La Karavelo - Esperanto".
João José Santos senatente
prenita de la fotilo.
Sur negranda tablo montriĝis
kelkaj ekzempleroj de la revuo *La
Karavelo*, DVDoj kun la kolekto de
LK 2007-2008, DVDoj kun la vivo
de Zamenhof, de la aŭtoreco de
Djalma Pessata, kaj kelkaj
flugfolioj por informo al la
vizitantoj.
En la sama tablo la budisto devis
labori ĉekomputile en la
servizitantaj momentoj.

La gimnaziestro de
Estremoz, D-ro José Daniel
Sadio, kune kun la
familianoj, aprezas la
esperantan budon.
Ĉimomente okazas
esperanto-kurso en lia
gimnazio. →

